






№ 03
1966

G.L. GHELLI

ITALIA

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti

ferroviario



18-a INTERNACIA FERVOJISTA KONGRESO

UTRECHT (Nederlando): de la 14-a ĝis la 20-a de majo 1966-a

De la 14-a ĝis la 20-a de majo, okazis en Utrecht (Nederlando) la 18-a IFEF-Kongreso. Partoprenis 450 delegitoj de 19 nacioj. Utrecht estis taŭga sidejo por nia fervojista kongreso: fakte ĝi situas en la centro de la lando kaj estas grava fervoja trafikligilo. La programo estis tre alloga: belegaj promenadoj laŭlonge laŭ kanaloj kaj laborkunsidoj alternis por ne tedi la partoprenintojn; gravajn diskutojn sekvis fakaj kaj amuzekskursoj, jen, pli detale, la programo.

Dimanĉon la 15-an de majo: je la 10,30 horo ni ekskursis per aŭtobusoj tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj. Tiel ni povis admiri la malnovan parton de Utrecht, ĉirkaŭbarita per novaj kaj malnovaj kanaloj, kaj la modernaj kvartaloj, kiuj tamen, posedas propran karakteron, propran stilon, sen indulge al modernismo. Posttagmeze en la Geerte preĝejo okazis komuna diservo, kato lika kaj protestanta: ĉu eble la unua mallonga paŝo ĝis la unuiĝo de la kristanoj, laŭ la Ekumenika Koncilio?

Vespere je la 20 horo en digna salono okazis la solena malfermo de la kongreso. Post la salut-vortoj de la membroj de la honora komitato, kaj de la reprezentantoj de 19 eŭropaj nacioj, la Prezidanto de Jong per simplaj sed emociaj vortoj malfermis nian 18-an Kongreson. Ankaŭ la Prezidanto de "Dopolavoro Ferroviario" de Bologna ĉeestis la inaŭguron kaj la kongreson, kaj alportis la saluton de la Centra Oficejo de "Dopolavoro Ferroviario" kaj promesis helpon al fervojistojn esperantistojn, kaj subtenon kiam, nia vice, gastos en nia urbo Esperanto-Kongreso de Fervojistoj.

Lundon la 16-an de majo, ni ekskursis al la regiono inter la grandaj riveroj. Tie ni povis admiri la tipajn malnovajn muelilojn, kiuj dum jarcentoj, pumpis akvon el la polderoj. Poste ni iris al bela urbo GOUDA. Tie ĉi ni admiris la belegajn vitralojn de la Katedralo kaj la urbodomon, unu el la plej malnovaj de Nederlando. Tiu ĉi ekskurso donis al ĉiuj eksterlandanoj gravan impreson pri la persisto, obstino kaj laboremo de la Nederlandanoj kiuj, dum jarcentoj luktis kaj luktadas, kontraŭ la maro por elŝiri el ĝi, teron, pecon post peco.

Vespere okazis, en la kongresejo, internacia balo kaj ĉiuj, junaj kaj ne junaj fariĝis infanoj dancante kaj ludante kune.

Mardon la 17-an matene, okazis la kunveno de IFEF-Komitato kun IFEF-Estraro. Estis akceptitaj la novaj Federacia kaj Kongresa Regularoj kaj diskutitaj la raportojn de la estraro kaj de la landaj sekcioj. G.E.F.A. prezentis novan Fervojan terminareton kiu enhavas 2000 fakesprimojn. Dume, la nepartoprenintoj al la Kunveno promenis tra la malnova parto de la urbo sub la sperta gvido de S-ro Punt. Tre interesa la programo de la arta vespero. Kantis, en malnova slava lingvo, la Bizanca ĥoro de Utrecht. Instruis kaj direktis la ĥoron d-ro Miroslav Antonoviĉ, Ukrain-devena.

Merkredon la 18-an, dum la unua laborkunsido, post multaj diskutoj oni decidis aliĝi, kiel faka Asocio, al U.E.A. Posttagmeze okazis, samtempe, diversaj fakaj ekskursoj en kiuj partoprenis, multnombre, la delegitoj.

Vespere en la teatra salono okazis la prezentado de diversaj belaj filmoj kaj lumbildoj. Fine la faka prelego, ankaŭ kun lumbildoj, pri "La meka nikigo de la pecaĵmanipulado en Nederlando".

Ĵaŭdon 19-an: matene daŭrigo de la kunsid-laboroj, posttagmeze aŭtobusa ekskurso al arbarriĉa regiono "Velewe" kun halto por vespermanĝo en Elburg, fiŝkaptista belega urbeto kie ni aĉetis kaj gustumis fumajitajn angilojn.

Vendredon la 20-an: tuttaga ekskurso per trajno ĝis Rotterdamo, kaj de tie per ŝipo; veturado tra la marbrakoj por viziti la "Delta Plano-Laboron" Survoje al Rotterdamo S-ro de Jong, Prezidanto de I.F.E.F., fermis la kongreson. La vojaĝo estis tre bela, sed iom da melankolio pezigis la etoson, la melankolio kiu antaŭis la disiĝon; morgaŭ ĉiuj disiros al propraj landoj

TRADUKO DE LA ITALLINGVA ARTIKOLO PRI NIA 18-A INTERNACIA KONGRESO DE
FERVOJISTOJ-ESPERANTISTOJ, APERINTA EN "NOTIZIARIO DE D.L.F.- BOLOGNA

"En Majo okazis, en la Nederlanda urbo Utrecht, la XIII-a Internacia Kongreso de la Fervojistoj-Esperantistoj, nome niaj kolegoj, kiuj kun granda entuziasmo kaj persisto klopodas por la disvastigado de Esperanto, kun la intima penso kaj deziro ke, en ne tro malproksima estonto, tiu ĉi lingvo estos adoptata kiel sola lingvo en la mondo. La delegitaro sendita de la Esperanta grupo de D.L.F. Fervojista Postlabora Klubo) de Bologna estis akompanata, laŭ decido de la Estrara Kunsido, de la Prezidanto de la Klubo, kiu donacis al la esperantistaj fervojistoj de la gastama urbo, bronzan mi niaturon de "Neptuno" de Gianbologna.

La manifestacio estis interesplena kaj disvolviĝis en afabla kaj simpatia etoso. Oni vidis Delegitoj de diversaj landoj kiun interfratiĝis, kaj, utiligante la komunan lingvon, diskuti pri ĝeneralaj interesaj problemoj, pri argumentoj rilatantaj la laboron kaj la vivmanieron en la diversaj landoj kaj pri multaj aliaj aferoj kun plej granda simpleco kaj sen miskomprenimo. Dum la kongresaj tagoj, oni prezentis ankaŭ teknikan vortareton pri Fervojoj, kun la espero de ĉiuj ĉeestantoj ke ties uzado fariĝu ĝenerala post malmultaj jaroj. Inter la plej gravaj konsideroj aperigitaj dum la kongreso oni devas noti la danĝeran ekzistadon en nia epoko, de multnombraj, diversaj lingvoj, kiuj povas nur pliigi la naciismojn, dividi la homojn kaj prokrasti la solvon de unuecaj kaj fratigaj problemoj.

Sinceran laŭdon al la Bologna Esperanto-Grupo kiu per sia multnombra kaj kvalifikita Delegitaro donis validan kontribuon al la sukceso de la kongreso. Sinjoro G. Gimelli, komitatano de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kaj digna reprezentanto de la Italaj Fervojistoj, meritas la plej sinceran laŭdon de la Estrara Kunsido de D.L.F. de Bologna pro sia agado en tiu ĉi cirkonstanco, kaj oni instigas lin daŭri, fide kaj sindone, en sia laŭdinda agado por afero tiel meritplena.

La venonta kongreso okazos en Fulda, Germanio; en 1968 certe en Bulgario, kaj la sekvonta en Francio. En 1970, eble, la kongreso okazos en Italio kaj la Estrara Kunsido de nia Klubo devos ekzameni la eblecon okazigi ĝin en Bologna, aŭ por plifortigi kaj doni pli da influo al la loka Esperanta Grupo, aŭ por permesi al la urbo "klera" doni ankaŭ sian kontribuon al tiel alta idealo, kiu celas plibonigi la interkomprenon inter la popoloj por la bono de la tuta homaro.

Tradukis: Gianluigi Gimelli-Bologna

EMERITIĜIS LA REDAKTORO DE H.F.M. S-ANO ŜIMONO CSÒRA

La redaktoro de "Hungara Fervojista Mondo", kolego Ŝimono Csòra, fariĝis 60-jaraĝa, kaj antaŭ nelonge li emeritiĝis. S-ano Ŝ. Csòra estis, ekde la unua numero, la redaktoro de H.F.M. seninterrompe ĝis lia emeritiĝo. La eminenta lingvoscio kaj laŭmodela parolkapablo de amiko Csòra altigis la nivelon de la revuo de jaro al jaro. Same lia entuziasma instru-laboro helpis la memorindan 14-an IFEF-Kongreson en Budapeŝto, kiun multege li sukcesigis kiel lertega L.K.K.-ano. Kiu ne memoras nian simpatian kolegon kromnomita de post la Budapeŝta Kongreso "S-ro Mikrofono"! Li certe estas multe pli konata de niaj I.F.E.A.-anoj sub tiu kromnomo. La italaj fervojistaj esperantistoj deziras al li plenan sanon kaj energion por plua poresperanta laboro kaj bonan, longedaŭran kaj ripezan emeriton!

NOVA ESPERANTO-STRATO EN BAVARUJO

La Konsilantaro de la Bavara urbo WEIDEN (Oberpfalz-Germanio) demonstris sian konprenon kaj agnoskon por la kultura valoro de la Internacia Lingvo, per nomigo de strato "Esperanto". La nomigon stimulis kolego Ricard KONING, Prezidanto de la Fervoja Esperanto-Grupo Weiden kaj komisiito por Esperanto en la distrikto Regenssburg.
ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "I.F.E.A." kore gratulas.

EKSKURSO TRA ĈEĤOSLOVAKIO

De la 4-a ĝis la 12-a de junio ni vizitis Prahon kaj Ĉeĥoslovakion kun la karavano organizita de "Dopolavoro Ferroviario" de Bologna.

Tuj post la Aŭstria landlimo ni eniris belegan, arbarriĉan regionon, kaj nia trajno, "Sansouci", multfoje kuris inter du vicoj da altaj, elegantaj abioj. Riverojn kaj starlagetojn ni preterpasis, kaj ni ĉiuj resta dis ĉe la fenestretoj por ĝui la panoramon. Finfine Praha, la turara mezepoka urbo, akceptis nin kun la mil lumoj de sia nokta vivo; (ni alvenis malfru-vespere pro negrava incidento kiu malhelpis nin). Ni loĝis en la belega hotelo ROH kaj ĉiam ni trovis helpon kaj komprenon ĉe la servistoj kaj interpretistoj. Bonsance ni estas esperantistoj kaj la lokaj geamikoj ekde la stacidomo, kie akceptis nin, preskaŭ ĉiutage estis kune kaj akompanis nin dum la vizitoj al la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj. Per tiuj ĉi simplaj linioj ni volas unue danki Inĝ. Holy'-n kaj lian ĉarman edzinon kiuj sindone akompanis nin viziti la plej belajn kastelojn de la suda Boemio, nome Orlik kaj Hluboka; inĝ. Stastny' kiu por nin renkonti venis de Plzen, kaj gvidis nin tra la urbo; Inĝ-roj Řebíček kaj Král, S-ro Hiža k.t.p.

La akcepto ĉe la Esperanto-rondeto de Ministerio por Trafiko, okaze de la semajna renkontiĝo, estis tre impresa; tie krom la malnovaj amikoj ni renkontis novajn gekursanojn kaj Hungaran fervojista-paron kiu vizitis samtempe Prahon. Danke al la tradukado de S-anoj Král kaj Hiža kaj Holy', S-ino Svobodova, redaktorino de la faka fervojista revuo "VPŘED"(Antaŭen), intervjuis nin kaj petis novaĵojn pri nia fervoja medio.

La programo de la ekskurso estis tre interesa: vizitoj al martira urbo Lidice, al Mariánské Lázně kaj Karlovy Vary, belegaj kuraĉlokoj, ekskursoj piede kaj aŭtobuse tra la urbo por rigardi la plej belajn monumentojn: la Hradčani kastelon, la Katedralon Sankta Vito, la reĝan someran restadejon "Belvedere", "Loreto", barokan konstruaĵon kiu entenas kopion de la Sankta Domo de la itala urbo Loreto. Sed la tuta urbo estas belega kaj vidinda kiel muzeo. Jen la malnova urbo: ĉiu palaco, ĉiu domo en la sama stilo: neniu moderna konstruaĵo malbeligas ĝin. Sur la ĉefa placo staras la malnova urbodomo kies horloĝturo altiras ĉiu horo, multegajn homojn. Fakte la figuroj moviĝantaj, (la morto kiu sonoras sonorilon por anonci la forpason, kaj la aliajn kiuj ne volas kaj skuas la kapon, la koko kiu krikorias, kaj la Apostoloj kiuj preterpasas) ne estas kutimaj. Sed la vera stelo de tiu ĉi placo, por ni de Praha mem, estas la gotika Tyn preĝejo. Rimarkinda ankaŭ la monumento de Jan Hus. En la juda kvartalo ni admiris la malnovan frugotikan sinagogon kaj la judan tombejon. Sed Praha enhavas ankaŭ multajn belegajn kaj famajn muzeojn, multajn parkojn kaj ĝardenojn; en ĉiu placo, ĉie ekzistas iom da libera ejo, jenbedo, jenverdaĵo, jen arboj. Vespere ni ĉeestis ankaŭ spektaklojn rimarkindajn kiel la stranga prezentado de "Laterna Magika", miksaĵo inter filmo kaj sceneo. En la mirinda teatro "Smetana" ni ĝuis bonegan prezentadon de opero "Rigoletto" de Giuseppe Verdi, kun moderna kaj interesa scenografio.

Ĉiuj belaĵoj havas finon kaj ankaŭ tiu mirinda ekskurso finiĝis. Jen lasta ĝentilaĵo: sur la perono dum ni atendis nian vagonaron, niaj Prahaj geamikoj donacis al ni ĉiuj bukedon da floroj kaj memoraĵojn de Praha.

Delvina kaj Germano GIMELLI - Bologna

GVIDLIBRO TRA P A R I S

Originale verkita de nia amikino JULIETA, kovrilo kaj ilustraĵoj de l'aŭtorino, 250 paĝoj. Eldonita de Esperantaj Francaj Eldonoj, 11 rue Paul Vergne, Marmande-47, Francujo. Kiu intencas viziti Parizon trovos en ĉi tiu verko detalan priskribon de ĉiuj vidindaĵoj de tiu urbo kaj de multaj rekomendindaj promenoj. La metoda aranĝo kaj la 28 fotoj, 33 plumdesegnaĵoj kaj 13 kvartalplanoj faras ĉi tiu gvidlibro tre praktika. Vi povas petis ĝin al: S-ino Juliet FAYOT, 11 place des Vosges, PARIS - 4° (Francio)

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN WIEN (I.E.M.W.)

Samideano Hugo Steiner, kortega konsilanto, emerita fervojista ĉefinspektoro, transdonis la gvidadon de la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (I.E.M.W.) al samideano D-ro Walter Hube. Estas mondkonate, ke la Muzeon fondis antaŭ 39 jaroj, en 1927, s-ano Hugo Steiner, kiu ĉiam fidele zorgis pri la Esperantaĵoj senditaj de la esperantistoj el la tuta mondo.

La unua loko de la Muzeo estis iama ĉevalejo en Wien, sed dank' al la penadoj de s-ano Steiner, finfine ĝi ricevis konvenan hejmon en "Hofburg" (Imperiestra kastelo), kie kvin salonegoj estas certigitaj por la kolektaĵoj de jaro al jaro pli riĉaj. S-ano Hugo Steiner ne adiaŭas nin tute. Li restas la Honora Prezidanto de la Fervojista Esperanto-Movado en Aŭstrio kaj redaktas ankaŭ en la estonto la "Informilo de I.E.M.W."

Varmkore ni salutas nian elstaran kolegon, kiu ofte akceptis amike ankaŭ italajn fervojistajn esperantistojn vojaĝantajn tra Vieno, kaj kiu ofte helpis nian laboron, donante informojn per kiuj ni verkis artikolon pri I.E.M.W. kiu aperis ankaŭ en nia "Informa Bulteno". Dezirante sanon kaj forton al s-ano Hugo Steiner, ni transdonas lian peton al niaj legantoj: Ĉiuj esperantistoj subtenu lian posteulon, s-anon D-ro Walter Hube kaj I.E.M.W.! Nia Muzeo estas nia fortikaĵo! Ni klopodu riĉigi, propagandi kaj viziti ĝin!

S P O R T O

POR LA EUROPA POKALO

La svisa arbitro Dinst havis malfacilan laboron en la stadiono Old Trafford, kiam Manĉester Junajted kaj Partizan, la ĉampionaj futbal-teamoj de Britujo kaj de Jugoslavio, renkontiĝis por decidi kiu el ili eniros la finalon. Kvankam tiun konkuron gajnis la angloj, la finalon eniris la jugoslavia teamo, pro antaŭa pli bona rezulto. Eble pro la multaj miskomprenoj dum tiu ĉi kaj multaj aliaj internaciaj renkontiĝoj, la tuta teamo Partizan decidis lerni Esperanton. Ili deklaris: "Tutkore ni aliĝas al la iniciato "Esperanto, la internacia lingvo de la sportistoj de la mondo". Ĝi ebligos novan paŝon de la sportistoj al la internacia kompreniĝo de la popoloj". Ĉu ankaŭ la Manĉesteranoj konsentas?

SAVU LA REVUON "NOVA CIVITO"

Kvankam malĝoje, la eldonejo de "Nova Civito" decidis ĉesi la publikigon de la revuo, tro pasivan; escepte ke . . . la esperantistoj ne volus sin ŝarĝi per la tuta administracio kaj direkta kontakto kun la legantaro.

Pro tio oni decidis reaperigi la revuon zorgante precipe pli vivan interparoladon kun la legantoj, kondiĉe ke la nombro de la abonoj permesos kaj promesos daŭran kaj finance sendependan vivadon. Ĉu vi volas kunlabori al la efektivigo de tiu ĉi iniciato? Se jes, ĉu vi volas vin aboni kaj pagi abonojn por kelkaj viaj korespondantoj kaj amikoj? Al la personoj aŭ grupoj kiuj sendos pli ol kvin abonojn estos sendata, senpage, unu abonon plie. Alia kunlaboro estas la diskonigo de la iniciato, laŭ la personaj eblecoj.

Por la momento ne sendu monon, sed nur via decido pri la numero de la kopioj, kiujn vi volos en la kazo de reapero de la revuo. Via decido sendu al: P.Giacinto JACOBITTI, Piazza S.Maria Maggiore, 8 ROMA (Italujo).

LA UZO DE ESPERANTO EN LA MESO

Antaŭ pluraj monatoj, la prezidanto de Internacia Katolika Unuiĝo E-sta (IKUE), Sac.A.BECKER, oficiale petis la Roman Eklezion agnoski al Esperanto la samajn rajtojn, kiujn akiris en la katolika liturgio la naciaj lingvoj.

La liturgia komisiono akceptis la peton de IKUE, sed lasis la finan decidon al la Sankta Papo. Paŭlo la VI-a en aŭdienco al Kardinalo Lercaro, prezidanto de la Koncilio, la 21-an de aprilo 1966 konsentis, ke IKUE "okaze de renkontiĝoj, kunvenoj kaj kongresoj uzu Esperanton en la legaĵoj kaj en la "oratio fidelium" (preĝo de la fideluloj)."

Kvankam la permeso ne ampleksas la tutan diservon, ĝi tamen estas enkonduka vojo al tiu celo.

NIAJ KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ

51-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO-Budapest, 30.VII - 6.VIII 1966.

Sub la Alta Protektado de S-ro Ödön KISHAZI, Vicprezidanto de la Hungara Popola Respubliko. Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176 Rotterdam-2 Ned. Fervoja Rabato: Per cirkulero no.106256/1966.1/8.D de la 16-a de marto 1966 la Hungara Ministerio pri Transportoj informis ĉiujn kompetentajn fervojajn instancojn en Eŭropo, ke la partoprenantoj en la 51-a Universala Kongreso rajtas ricevi rabaton de 50% je la normala prezo por la vojaĝbileto en la Hungara teritorio. L.K.K. estas nun atendanta informojn pri sama favoro fare de aliaj ŝtataj fervojoj.

Aliaj Rabatoj: La partoprenantoj en la 51-a Universala Kongreso havos la eblecon uzi senpage -dum la kongresa periodo- ĉiujn publikajn transportilojn en Budapest (tramoj, aŭtobusoj, subtera fervojo).

Limigo. Notu Bone!: En pluraj Esperanto-gazetoj estis publikigita limigo koncerne la Inaŭguron. Ni povas informi, ke ĝi ne plu validas, ĉar la lasta momento estas disponigita al L.K.K. alia Inaŭgurejo, kiu povas enhavi 5000 personojn. Sekve, ankaŭ la kongresanoj super 2500 povos ĉeesti la Inaŭguron kaj ĉiujn aliajn erojn de la kongresa programo.

Esperanto-Parko: Okaze de la Kongreso estos inaŭgurita en Budapest "Esperanto-Parko", kion sekvas gaja interamikiĝa programo en la sama loko kun la partopreno de Budapeŝta publiko. Detaloj en la Kongresa Libro.

Kongresa Libro: En la komenco de julio ĉiu aliĝinto ricevos la Kongresan libron, kiu enhavos i.a. la detalan programon de la Kongreso kaj la liston de la partoprenantoj.

Foto-Konkurso: Ni memorigas ke la limdato por alsendo de la konkursaĵoj estas la 1-a de julio 1966.

Atenton!: La fervojistoj-Esperantistoj -kaj siaj familianoj- aliĝintaj al la 51-a U.K. sendu la numeron de sia fervojista legitimilo senprokraste al la adreso: Centra Fervojista Esperanto-Fakgrupo, Budapest, VI., Népköztársaság útja 75, Hungario. Tie ni bezonas por pretigo de la senpaga fervoja bileto, kiun ni intencas sendi al la adreso de la fervojistaj kongresanoj. Statistiko (je 24-5-1966): Ĝis la 25-a de majo aliĝis entute 2867 personoj el 38 landoj.

LA 37-a ITALA ESPERANTO KONGRESO okazos ĉijare en Carrara de la 17-a ĝis la 22a de septembro 1966-a. Tie okazos la jara Asembleo de Itala Esperanto-Federacio kaj la Jarkunvenoj de la Itala Esperanto-Instituto, de la Itala Fervojista Esperanto-Asocio, de la Itala Esperanto-Junularo kaj aliaj. En "Carrara Marittima" okazos la 19-ande septembro la internacia balo, la 20-an la folkloro vespero, la 21-an la vizito al marmo-minejo kaj al Luni, kaj la 22-an la ekskurso al Kampo de Cecina.

E.F.S.-1966. EUROPA-FERIOSEMAJNO EN SVISLANDO: La 8-a E.F.S. okazos de la 4-a ĝis la 10-a de septembro 1966 sur la monteto Boldern apud Männedorf, ĉe la lago de Zurigo kun jena bela programo:

Dimanĉe: la 4-a de septembro: Kolektiĝo je la horo 15,30 en Zürich H.B. antaŭ la stacidoma bufedo 2a kalso, liberaera restoracio. Proksimume 30 minutoj poste ni veturos trajne al Männedorf kaj buse al sur Boldern, kie troviĝas nia nova restadejo. Lunde: Ekskurso per buso al Dietlikon por viziti la fabrikan COCA-COLA. Hejmen trans Klotten preter la internacia flughaveno. Marde: Grandioza busekskurso trans la alpan pasejon Klausen ĝis Altdorf (Monumento de Tell). Merkrede: Trans Lützel-lago, kun ĝiaj naĝantaj insuloj, al la antikva kastela kaj roza urbo Rapperswil S.G. Zoo kun delfinoj. Ĵaŭde: Per aŭtobuso tra Schaffhausen (Munot-turo) al la kastelo Laufën kun la naturfenomeno Rejnŝtalo. Vendrede: Libera tago aŭ propravole ekskursi. Sabate: Ekskurso per buso, ŝipo kaj fervojo al la montara loko Einsiedeln (monaĥejo kun Nigra Madono), pikniko ĉe la lago Sihl.

Prezo por la pensio kaj la ekskursoj, aliĝa kotizo. Entute nur sFr.170,- Referencoj kaj informoj: s-ro Germano Gimelli, Via Donato Creti, 61 BOLOGNA (Italio). Patronecas: Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj.

HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO: La Hispana Kongreso de Esperanto okazos ĉijare en Bilbao, de la 19-a ĝis la 23-a de julio. Estas antaŭvidita la ĉeesto de pli ol 400 gekongresanoj, inter ili multaj eksterlandanoj. Krom aktivaj laborkunsidoj de H.E.F. okazos akcepto flanke de la oficialaj instancoj, tuta taga ekskurso, folklora festo kaj bankedo. Adreso: 27-a Hispana Kongreso de Esperanto, Barrencalle Barrera, 7 BILBAO (5), Hispanio.

INTERNACIAJ FERIOTAGOJ EN KLOSTERNEUBURG. De la 26-a ĝis la 30-a de julio 1966 okazigos Internaciaj Feriotagoj en Klosterneuburg. Sekvos komuna aŭtobusa aŭ ŝipa veturo al la Universala Kongreso en Budapeŝto. Aliĝilojn kaj informojn donas la Organiza Komitato, 1150 Wien 15, Fünfhausgasse 16. Aperis faldprospekto Esperantlingva kun datoj pri la danuburbo Klosterneuburg.

TURISMAJ INTERNACIAJ FERIOJ EN GRESILLON. De la 24-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto dum la Kulturaj kaj Turismaj Internaciaj Ferioj en la kastelo Grésillon okazos interesaj prelegoj de D-ro W. Bormann (Germanujo), S-ro P. Chevalier (Francujo), S-ro Frangeul (Francio) kaj S-ro J.P. Guillot (Francio). Krom la prelegoj okazos ankaŭ vizito tra Parizo, ekskursoj al la Loira-valo, al urbo Le Mans kaj al la Zoologia Ĝardeno en La Flèche. Ĉiuj informoj donas: Esperantista Kulturdomo Kastelo Grésillon, 49-Baugé, Francujo.

ZVIKOV. LA "REĜO INTER ĈEĤAJ KASTELOJ", estas konstruita en la 13-a jarcento sur alta roko, super kunfluo de riveroj Otava kaj Vltava, 100 km. sude de Prago. Sed nun la akvonivelo, levita je 70 m. per konstruo de valbaraĵo apud Orlik, atingas preskaŭ la murojn de la kastelo kreinte lagon 70 km. longan. Surloke estas pruntejo de motor- kaj rem-boatoj, haveno kun regula ŝip-trafiko kaj haltejo de pluraj aŭtoĉaraj linioj. Novaj pontoj kaj asfaltitaj ŝoseoj ligas la lokon kun bela ĉirkaŭaĵo. Viziti tiun belan regionon post la 51-a U.K. invitas vin "Vlastivědné muzeum, Pisek, Ĉeĥoslovakio!" Pluraj ĉeĥaj esperantistoj tie deĵoras kaj preparis interesajn ekskursojn kaj ŝipvojaĝojn.

6-a/7-a INTERNACIAJ FERVOJISTAJ SKISEMAJNOJ EN KRIMML-AUSTRIO, 11-18;2;1967 18 - 25.2.1967. Organizanto: S-ano Johann Geroldinger, Marcusgang 7, A-4020 Linz/D. Aŭstrio = A.F.E.F.-ĉefsekcio Linz.

La feriodomo "Marienhof" kiu akceptos nin troviĝas vid-al-vide de la fervoja stacio Krimml. La domo enhavas 50 litojn (du 1-, ok 2- kaj divers. 3-4 litaj ĉambroj), en ĉiu ĉambro troviĝas centra hejtilo, lavujo kun fluanta akvo malvarma kaj varma, elektra lumo kun kontaktilo 220 V, litkestoj, ŝranko, K.t.p. Je kvinminuta distanco de la domo troviĝas la skitereno kun tirlifto 800 m. longa kun altecdiferenco de 200 m. La uzon de la tirlifto ĉiu mem devos pagi. La partoprenantoj povos lui skiojn je prezo de 20-30 aŭ.ŝ. kaj ŝuoj je 15-20 aŭ.ŝ. po tage ĉe la skiinstruisto Toni Hölzl. La skiinstruisto parte instruos kaj parte ekskursgvidos la partoprenantojn. Krom amuzaj vesperoj (ne forgesu kunporti specialan vestaĵon por la karnavala balo!) ankaŭ lingva konkurso estos aranĝata (libroj premioj). Kondiĉoj: bv. aliĝi kiel eble plej malfrue ĝis 15-a de decembro 1966 kaj samtempe transsendu la antaŭpagon de aŭ.ŝ. 60 po persono kaj semajno. Aliĝo sen antaŭpago ne validas! La antaŭpago estos enkalkulota en la tutsemajna aranĝprezo de proksimume aŭ.ŝ. 650 sed ne plu repagebla je okazo de ne partopreno!

NOVAJ TURISMAJ PROSPEKTOJ

La "Turisma porvojaĝa oficejo" (Granda Placo 42) de la Ĉeĥoslovaka urbo Kroměříz (Moravio), eldonis novan turisman Esperantlingvan prospekton kun fotoj titolita "Kroměříz hanakaj Atenoj-Ĉeĥoslovakio". Por plibonigo de nia Esperanta servo en Turismo, celadu ĉiuj -en la tuta mondo- eldoni similajn prospektojn. Per tiumaniero ni ekkonos pligrandan intereson por nia lingvo ĉe cetera publiko.

R A D I O R O M A

Esperanto-Casella Postale 320 Roma (Italia). de h.17,35 ĝis h.17,50 (M.E.T.) Ondlongoj metroj 25,20=Mc/s.11,90 kaj 30,90=Mc/s.9,71. Redaktoro: L.MINNAJA Ĉiudimanĉon. La unua parto dissendos diversajn temojn. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto".